

2019-07-16

## **Dua raporto de ILEI pri la 52-a Kongreso en Ĉaĉak, Serbio**

La kongresanaro povis malkovri la belan folkloron de Serbio kaj de la regiono de Ĉaĉak spektante tre belan nacian vesperon dimanĉe vespere. Koruso el 12 virinoj kun nomo «Ĉaĉaka Liro» regalis la kongresanojn per plej belaj kaj variaj kantoj. Infana grupo «Bambi» el 6 knabinoj kaj 6 knaboj dancis lokajn dancojn vigle kaj gaje en belegaj buntaj kostumoj.

Lunde matene okazis la solena malfermo en ĉeesto de la vicurbestro Sinjoro Vladan Milić kaj de la dekanino de la fakultato Sinjorino Danijela Milošević. La virina koruso denove aperis kaj kantis nian himnon kun niaj aldonaj voĉoj kompreneble. Ambaŭ gravuloj substrekis la honoron por la urbo akcepti tiom gravan internacian eventon. Ni revidos la dekaninon okaze de la dutaga Konferenco, kiu okazos en la universitato kadre de nia Kongreso ĵaŭde kaj vendrede, malfermita al lokaj instruistoj kaj profesoroj. La temo de la Konferenco estas la kongresa temo: «Lernado en virtualaj komunumoj».

Lunde posttagmeze okazis denove komitatkunsido kaj paralele lingvokursoj en du niveloj kaj kurso pri la serba lingvo. La unua parto de la 58-a AMO-seminario (Aktivula Maturigo) temis pri eksteraj rilatoj; Mireille Grosjean prezentis la diversajn zonojn de Eŭropo, iom pri UNESKO kaj UN kaj raportis pri siaj spertoj en siaj kontaktoj kun diversaj landaj delegacioj kaj ministroj.

La fama aktoro Sasha Pilipović aperis en teatro vespere en la vestaĵoj de Galileo Galilei; per sia vervo lia amuzis nin sed ne nur, ĉar la teatraĵo ankaŭ enkondukas pripenson pri la sinteno de persono, kiu akiris sciojn aŭ kapablojn, kiuj ĝenas la kutimojn kaj povas alporti problemojn. Ĉu silenti, rezigni, aŭ «kuraĝe antaŭen!», jen la demando.

Raportas la prezidanto Mireille Grosjean